

# La Blanka Rozo

Revuo de la  
FEDERACIO ESPERANTISTA DE  
YORKSHIRE KAJ HUMBERSIDE



N-ro 277

SOMERO 2017

## EDINBURGO

### Kunkongreso de Skota Esperanto-Asocio kaj de EAB

Komenciĝis per mistero – kie troviĝas la ejo? Du fojojn mi preterpasis ĝin sen rimarki, la trian fojon mi sukcesis, pro legado de malgranda, trotuarnivela afiŝo pri Melting Pot, sed mi ne tuj eniris, ĉar mi rekonis de malantaŭe alian erarvaganton jorkŝiran: mi povis gvidi Geoff Wood al la ĝusta pordo kaj en la vestiblon, kie ni kune legis la instrukciojn por malfermiĝi de ie supre la internan sekurecpordon, post kio ni per lifto aliris la kvaran etaĝon, kie troviĝis nia verda mondeto. Iam poste aperis ekstere iom pli granda afiŝo pri la kongreso.

Min ege plaĉis:

– en la unua vespero la ‘bonfara kvizo’, kiu instruis al ni nesciantoj iujn sciindajn (kaj kelkajn ne sciindajn!) faktojn precipe pri Skotlando. Tim Owen bone selektis kaj prezentis la demandojn kaj aparte bone partoprenigis (do per tio bonvenigis) novulojn kaj infanojn.

– la interkonan periodon, kiam eblis babili kun konatoj kaj ekkoni la ‘novajn vizaĝojn’, aparte el eksterlando.

– la sabataj prelegoj / prezentoj, tiom variaj sed ĉiuj interesaj: pri besta komunikado, pri poezio, pri Clarence Bicknell, pri Pasporta Servo, pri estintaj estontecoj – kia stimula tago! Tiom ke oni eĉ emis forgesi pri la ekstera pluvo! Bonŝance estis pli suna vetero por la vespermanĝa periodo: mi eliris por renkonti ne-esperantistajn amikojn, kaj mi iom bedaŭris devi lasi ilin en la restoracio (kie ili ankoraŭ alfrontis la deserton, pri kiu mi rezignis). Mi revenis por la komedia kvizo, kiu jes amuzis, sed kelkaj ‘ŝercoj’ (aŭ malicaĵoj) iĝis iom ripetiĝemaj, aparte pri unu-du ŝatataj neŝatatoj, nu, *pri gustoj oni disputi ne devas*. La kvizo – la sola vespera aranĝo - finiĝis surprize frue, sed ne tiom, ke mi povis trovi miajn amikojn kaj ĝui kun ili postdeserton!

– dimanĉe la dua poezia ateliero. Se hieraŭ mi diskutis kun tri hispanlingvuloj, hodiaŭ nur la gvidanto, Jorge Camacho estis tia; ĉeestis du usonanoj, du britoj, kiuj loĝas eksterlande, kaj mi. Jorge tre lerte prezentis diskutigajn ekzemplojn de Esperanto-poezio.

- dimanĉvespere, post fermo de la kongreso, sufiĉe gaja kvinopo elserĉis taŭgan refreŝigejon, kie pasigi la 'tru-horon' antaŭ la komuna vespermanĝo. Anglo, du skotoj, du hispanoj eniris trinkejon... nu, vi konas la rakonton. La juna verŝisto vere interesiĝis pri nia komunikilo kaj verŝajne pli informiĝis post nia konversacieto. La vespermanĝo estis tre agrabla - la ejo estis ne tro brua, do eblis konversacii, kaj la manĝoj estis bonkvalitaj, bongustaj.

– lunde mia privata ekskursotago. Mi decidis ne aliĝi al la planita grupa vizito, sed pasigis plurajn horojn en la skota nacia galerio pri moderna arto, nur kelkcent metrojn for de mia semajnfina loĝejo. Ankaŭ tie mi eskapis la pluvon kaj kontraŭe kaptis centojn da brilaj ideoj!

Malcolm Jones

## Grava elpaŝo dum la jarkunveno de EAB

Estante multjara membro de Esperanto-Asocio de Britio, mi petis parolrajton dum la jarkunveno por omaĝi al mia forpasinta kolego-amiko, Paul Gubbins, antaŭa prezidanto de EAB, korektante asertojn en la protokolo de la antaŭa jarkunveno.

Mi unue skizis niajn komunajn fonojn – samaĝuloj, kiuj ambaŭ elektis studi kaj poste instrui la germanan lingvon; ambaŭ serioze eklernis Esperanton en 1984 (estis Paul, kiu gajnis la tiujaran asocian premion kiel ‘Plej bona nova lernanto’!); en sekvaj jaroj ni ambaŭ iĝis komitatoj / estraranoj de EAB kaj de ETA (Esperanto Teachers’ Association) kaj iĝis kuratoroj de NoJEF (la brita fonduso por subteni junajn esperantistojn); ni dediĉis multan tempon kaj energion al Esperanto-edukado, foje kune en Barlaston; Paul Gubbins gvidis priteatrajn semajnfinojn kaj mem verkis dramojn, kiujn mi kaj aliaj prezentis publike dum naciaj kongresoj kaj dum la Florenca UK. Ne estis surprize, do, ke ni havis oftajn kontaktojn.

Mi emfazis la Gubbins-ajn kvalitojn: intelektulo, kiun karakterizis kompatato kaj honesteco; idealisto, kiu laboregis por nia afero sen atendi ian rekompencan... La retmesaĝa anonco de Paul al la kuratoroj de NoJEF – la 15-an de decembro 2015 – ke li demisias kiel kuratoro, jam estis ŝoka, sed pliaj ŝokoj aperis en la tion sekvantaj privataj respondoj al miaj demandoj. Paul demisiis samtempe kiel membro de la estraro de EAB, kaj do ankaŭ kiel ĝia prezidanto. En du retmesaĝoj, kiujn mi voĉlegis, Paul rivelis la veran kaŭzon de la demisioj – konfidenca-rompo ene de la komitato, sed li ne volis kaŭzi problemojn por la asocio, do publike prisilentos tion. Mi respektis tiun grandaniman deziron, kaj laŭe agis. Kun la paso de tempo tamen, Paul iĝis mem seniluziigita de la agoj de la restanta malgranda komitato (el kiu alia membro ekisigis samperiole kiel li), li bedaŭris sian silentemon kaj li intencis baldaŭ riveli la veron; sed lin trafis la morto tro frua (en aŭgusto 2016). Pro tio mi transprenis la respondecon. Mi klarigis, ke la du privataj mesaĝoj enhavis esperantlingve pli-malpli la saman enhavon kiel lia oficiala demisia letero al la komitato – en la angla pro juraj kialoj – kiun voĉlegis alia EAB-membro Peter Bolwell. Post la voĉlegado mi, kun esprimo de granda bedaŭro, petis la sekretarion nun protokoli la veran kialon por la demisio de PPG kaj inkluzivi kopion de lia ekisigletero kun la protokolo.

Poste dum la jarkunsido oni diskutis pri la nova posteno kreita lastatempe de la estraro de EAB, tiu de direktoro. Pluraj membroj jam skribe esprimis dubojn pri la larĝa rolo, kiun oni alskribas al la postenulo; en antaŭaj diskutoj pri ĝia naturo, oni antaŭvidis pli limigitan rolon. La postenon nun okupas Tim Owen, antaŭa komitatano de EAB. La kreo kaj eco de la nova posteno troviĝas je la kerno de la afero pri la demisio de Paul Gubbins, ĉar ĝuste dum diskutoj pri ĝi (en novembro 2015), kiam iuj komitatoj forestis pro intereskonfliktoj, tute ĝuste kaj laŭregule, li esprimis opiniojn, kiujn iu poste malkaŝis al la koncernato, t.e. Tim Owen. Kiam mi deklaris, ke temas pri tiu, kiu transprenis la prezidantecon post Gubbins, nome Ian Carter, tiu ne neis la akuzon.

La asocio tial trovas sin nun en malfacila situacio. Je ĝia pinto troviĝas prezidanto, kies fidecon kaj kredindecon oni montris esti dubindaj; notindas, cetere, ke la jarkunsidon fakte gvidis – taktoplene kaj efike – Clare Hunter, multjara honora kasistino de la asocio. La manpleno da komitatoj, kiuj estris dum la lastaj monatoj (post la demisio de Tim Owen por enposteniĝi kiel direktoro), ĉiuj kandidatiĝis kaj reelektiĝis; krom Ian Carter temas pri Edmund Grimley-Evans, Clare Hunter, kaj Ed Robertson. Esperiga signo estas la elekto de pluraj aldonaj komitatoj, iuj novaj – Damon Lord, Kat Newbould – iuj malnovaj, jam servinte en sama aŭ simila rolo antaŭe – Geoffrey Greatrex, Sally Phillips kaj Geoffrey Sutton. Mi gratulas al ĉiuj, esperante pri efika, etika kunlaboro.

*Malcolm Jones*

## PIONIROJ DE ESPERANTO EN LEEDS

Sendube legantoj scias, ke Esperanto estis eldonita en 1887 fare de idealisma pola judo, D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917). La unuaj adeptoj de la nova lingvo vivis en la tiam Rusa Imperio, sed ĝi komencis gajni gelernantojn en Britio ekde proksimume 1900. En 2017 ni memoras la 130an datrevenon de la lingvo kaj jarcenton post la morto de ĝia genia kreinto.

La nomoj kaj adresoj de 16 fruaj esperantistoj en Leeds, kun registriĝa numero troviĝas dise tra la *Adresaro de Esperantistoj* (kolekto de adresoj de esperantistoj) inter Serio XXIII kaj Serio XXVIII. Viroj estas pli multaj ol la virinoj en ĉi tiu listo, eble antaŭvideble en la socio de tiu epoko. Tri el la dek ses estas patroj.

Post proksimume 1908, ekzistis neniu plua bezono formale aliĝi al Esperanto, ĉar lernolibroj pri Esperanto en diversaj lingvoj, inkluzive de la angla, fariĝis pli oftaj. Granda kvanto da revuoj utilis por novaj uzantoj de la lingvo kiuj serĉas kontaktojn en aliaj landoj. Oni ne multon scias pri multaj el tiuj listigitaj, kvankam mi trovis spurojn pri kelkaj.

Charles William Brunt (1882 - 1943) estis priskribita kiel butikisto en 1901, kaj en la popolnombro de 1911 oni registras lin kiel vendiston de akcesoraĵoj por tajloroj. Greevz Fysher (1845 - 1931) naskiĝis en Youghal, Irlando. Lia naskiĝnomo estis John Greeves Fisher. Greevz Fisher kreskis en irlanda kvakera familio sed post lia transloĝiĝo al Leeds en Yorkshire, li fariĝis individuisma liberpensulo. Li publikigis verkojn pri la sociaj kaj ekonomiaj sekvoj de siaj kredoj. Li ankaŭ estis aktiva en la virina movado, pri ortografia reformo kaj aliaj kaŭzoj. Li faris ĉion ĉi dum li gvidis la familian entreprenon.

Paul Otto Bünemann (1885-1959), germano, laboris de 1903 ĝis 1907 por la eksporta firmao Schunck Co. en Leeds, estante fakulo pri fremdlingva korespondado. Li transloĝiĝis al Grekio en 1909 kaj tie instruis Esperanton en Patraso.

La censo de 1901 montris ke Charles George Bennett (1856 - 1925) kaj lia familio loĝis ĉe High Street, Pateley Bridge. Dek jarojn poste la gepatroj kaj ambaŭ infanoj loĝis ĉe Jesmond House, Pateley Bridge. Charles, 55-jaraĝa, estis bankdirektoro ĉe la Londona City kaj Midland Bank. Li estis tre aktiva en ŝako-rondoj.

Pastro Hubert Stanley Darbyshire, aŭtoro de *The History of Methley* (La Historio de Methley,) servis kiel arma pastro en la Granda Milito de 1914 - 1918. Lia edzino Margaret Sophia Lucy Darbyshire, klare ne estas 'fraŭlino', kiel indikas la koncerna Adresaro.

Klare tiuj, kiuj interesiĝis pri la lingvo, kvankam ili loĝis dise en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, kunvenis de tempo al tempo. Laŭ interna kovrilo de *The British Esperantist* por 1905 Esperanto-Societo en Leeds estis fondita en septembro 1903. En 1904 la sekretario estis Sro. J. E. Wyms, 2, Marlboro' Grove, Leeds. Ekde januaro 1905 la sekretario estis James Mills. En 1908 W.S. Waddington estis la sekretario.

Tiuj pioniroj falis en forgeson. Du mondmilitoj kaj ekonomiaj krizoj malfortigis la fruan movadon. Ĉu fruaj protokolibroj pri la aktivecoj de la Leeds-a Esperanto-Grupo plu ekzistas? Ĉu iuj transdonis leterojn aŭ poŝtkartojn en la lingvo al postaj generacioj?

*Hilary Chapman*

**Notu:** kopio de pli detala listo haveblas de la redaktoro.

**ESPERANTO-SUMOO****Ĉu vi volas partopreni?**

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Esperanto-sumoo celas krei ĉiam pli da entuziasmaj Esperanto-legantoj kaj konatigi ilin kun la vasta Esperanto-literaturo. Ĝi estis lanĉita en 2009 kaj havas ekde tiam tiun saman ritmon kiel la tradicia sumoo, sed konkursantoj defias ne alian homon sed sin mem. Oni ne fizike venkas aliulon, sed provas plenumi promeson (aŭ esperon!) rilate la legadon de iu Esperanto-libro.

Partoprenanto libere elektas legotan libron - ĉu printitan, ĉu elektronikan - kaj difinas, kiom da paĝoj li/ŝi legos ĉiutage dum la 15-taga periodo. Pro ĝia strukturo kaj vasteco, la konkurso okazas interrete: la ĉeforganizanto, s-ro HORI Jasuo, dissendas retmesaĝajn invitojn, partoprenantoj responde aliĝas kaj estas enlistigitaj en unu el la pluraj grupoj. Ĉiun grupon (aŭ parton de grupo) kontrolas volontula helpanto; dum la konkursodaŭro, legantoj sendu konfirmon pri (mal)sukceso al la asignita kontrolanto post la unua, kvina, deka kaj dek-kvina tago. S-ro HORI poste kompilas liston de la (ne)venkintoj en ĉiu kategorio kaj dissendas diplomon, kiun ĉiu venkinto rajtas elprinti.

Komence la konkurso okazis nur inter 18 japanaj esperantistoj, sed ĝi baldaŭ kaj daŭre plivastiĝis, tiel ke en marto 2017 estas 360 konkursantoj el 30 landoj. Mi partoprenas ekde septembro 2015 kaj legis tre diversajn librojn - precipe originalaĵojn - de aŭtoroj aŭstralia, estona, franca, hungara, japana, sveda, svisa; miajn konkursojn kontrolis francino, japanoj, nepalano, serbo, turko, vjetnamo...

En la ĵusa maja konkurso du membroj de la Skipton-a grupo konsistigis duonon de la brita partoprenantaro!

Plenaj detaloj legeblas ĉe: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/>

*Malcolm Jones*

**'Postlasaĵo' de Muriel Shackleton**

Inter la Esperanto-paperoj de nia karmemora Muriel, kiujn donis al mi ŝia filino Mary, mi trovis tiun tajpitan artikoleon, verkita la 11an de aŭgusto 2000. Laŭ mia scio ĝi neniam aperis en *La Blanka Rozo*. Tamen laŭ mi indas aperi ĝin nun, ĉar ĝi ne nur estas interesa en si mem sed ankaŭ bone spegulas la stilon kaj interesojn de la verkinto.

*Redaktoro*

Lastatempe mi provis malgrandigi la kvanton da materialo en nia mansardo. Tie mi trovis 'trezorskatolon' kun leteroj el diversaj landoj, fotoj de mondkongreso en Harrogate 1961 kaj unu du el miaj provoj verki artikolojn por grupkunvenoj. Unu tian mi skribis en 1949, pri semajno en Stainsacre apud Whitby. Mi scivolas kia nun estas tiu paradizeto?

"En 1949 mankis entubigita akvo en Stainsacre, oni devis ĝin porti de vilaĝa pumpilo. Tamen la posedantoj de la domo en kiu ni loĝis havis sian propran puton, kaj pumpilon en la kuirejo, per kiu ili pumpis akvon en cisternon sur la tegmento. De tie, akvo fluis tra tuboj al ordinaraj kranoj. (Mi estis tute forgesinta pri tiu afero.)

Akvo ne mankis en la ĉirkaŭa kamparo; riveretoj ofte fluis trans vojoj, kie kutime estis ponto por homoj kaj travadejo por bestoj kaj ĉaroj. La pontoj estis el ligno, blanke farbita, tiel ke en verda angulo, super klara akvo, tiu faris belan bildon. (Miaj fotoj de tiu ferio estas nigra-blankaj.)

Aŭtobuso de Whitby ĝis Robin Hood's Bay preterpasis la stratfinon, survoje al Hawsker, apud pli granda vilaĝo. Tie situas la *Hawsker Bull*, kiun ni aŭdis klare dum nebula vetero. Estas nun pli moderna rimedo kontraŭ nebulo ĉe la maro' ne plu aŭdiĝas la brua sed ŝatata voĉo de la *Hawsker Bull*."

## SOMERA EKSKURSA TAGO!

Venu al York kaj ekskursu al la Kastelmuzeo kun ni je sabato 24an de junio. Ni renkontiĝos, ne ĉe la klubo Guppy's kiel kutime, sed antaŭ la eniro al la Muzeo (Castle Museum) je 1 30 pm.

Por trovi la muzeon iru unue la mezepoka kastelturo Clifford's Tower. La muzeo staras je la fora flanko de la korto sub la turo. Enirbileto kostas £10 (£9.09 sen donaco.) La muzeo enhavas i.a. ĉambrojn kun mebloj el diversaj jarcentoj, tutan straton kun butikoj el la 19a jarcento kaj prizono por debitoro. Aktuale estas ankaŭ elmontraĵo pri la unua mondmilito kaj kiel ĝi efikis sur la urbo. Ne eblas vidi ĉion dum nur unu posttagmezo!

Poste ni renkontiĝos en la bela kafejo apud la enirejo. Tie ni povos babili kaj partopreni diversajn ĉetablajn ludojn. Por pli da informo bonvolu kontakti la redaktoron.

Jack Warren

---

### Por via taglibro

Junio	24	Ekskurso (vidu supre)	Septembro	16	Nordokcidenta (NOEF) kunveno, Ĉestro
Julio	22-29	Universala Kongreso, Seulo, Koreio	Novembro	4	Federacia kunveno, York
Aŭgusto	19-20	Somerlernejo, Barlastono			Pli da informo haveblas de <a href="http://esperanto.org.uk">esperanto.org.uk</a>

---

## BONVENON EN GREZILJONO / GRÉSILLON

Maison Culturelle de l'Espéranto Grésillon, St. Martin d'Arcé  
F-49150 BAUGÉ-EN ANJOU

[kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

10-17.julio: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (precipe franclingve) => [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)

10-27.julio: Maratona Esperanto-kurso kun *Perla Mielo*

17-27.julio: **Renkonto de Alternativoj** de ĉiuj specoj kaj koloroj (**proponu temon!**)  
=> [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

28.julio-4.aŭg.: FESTO, junula E-renkonto kun koncertoj

05-13.aŭgusto: **Festa semajno por infanoj kaj familioj** => [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)

2017-aŭg-21/28 : SOMERAS, internacia **danco-semajno, pupteatro**, Esperanto-kursoj => [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)

**Skribu** al [bertox@free.fr](mailto:bertox@free.fr) se iu semajno interesas vin.

kaj pli poste:


2017-sept-11/15 : Migrada semajno (en Esperanto) kun *Olivier Buisson*

2017-okt-25/29 : Korusa renkonto de *Interkant'* kun *Zdravka Lenepveu*

2017-okt-25/nov-01 : **AŬTUNE** la ferioj - kun halovena festo, **seminario pri instruado kaj uzo de Esperanto kun infanoj**

(6)

### ***Krucvorteniĝmo***



#### **Indikoj**

(R) = nur radiko

**Horizontale:** 8. Ornamo por la hararo. 9. Paroli nerekte pri io. 10. Loko por libroj.  
11. Aspektante kiel opalo. 12. Simbola bildo. (R) 13. Ŝteli la vortojn de alia verkisto.  
16. Muzikistoj, kiuj ludas kune. 19. Ankaŭ muzikistoj - aŭ krimuloj. (R) 22. Ŝipestro. (R)  
23. Brusta parto de la korpo. (R) 24. Estro de monaĥejo. (R) 25. Ŝtatestro neelektita.

**Vertikale:** 1. Kuireja ilo kun maŝo. 2. Okazo. 3. Vira nomo. (R) 4. Duono de okulvitroj. (R)  
5. Faŝista movado en Hispanio. 6. Ŝatas ekz. ŝakon aŭ tenison. 7. Ofte vidata en certa lando.  
14. Tabeloj fine de libroj. 15. Instruata nur al adeptoj. 17. Tie fromaĝo logas muson. (R)  
18. Eco de bone konata homo. 20. Multaj sovaĝaj porkoj kune. 22. Tie troviĝas la sensoj.

#### ***Solve por Vortŝtupetaro en n-ro 276***

1. karto 2. kasto 3. basto 4. balto 5. malto 6. salto 7. salmo 8. saldo 9. faldo 10. falko 11. falto.

***Por la Vortrado en n-ro 275*** aldonis Malcolm Jones la jenajn vortojn:

ado, ardo, ardeo, adoro, dolaro, dromo, lado, medolo, modero, modlo, odo, odora, orado,  
orlo, ovalo, remado, rolado, vado, velado, veldo, vomado.

***La Blanka Rozo*** estas la revuo de la Federacio Esperantista de Jorkŝiro. Ĝi aperas trifoje jare: jarabono £6.00. **Redaktoro:** Jack Warren, 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF. Tel. 01642-82 76 79, rete: [p.warren47@hotmail.co.uk](mailto:p.warren47@hotmail.co.uk). **Federacia Prezidanto:** Jack Warren. **Protokola Sekretario:** Gillian Cartledge, 175 Hunter House Road, Sheffield S11 8TZ. **Kasisto:** Angus Wilkinson, 59 Cross Hills Lane, Selby YO8 4RU. Tel. 01757 210375, rete: [angus.wilkinson@sky.com](mailto:angus.wilkinson@sky.com).

